



Simpozio

Lingva justeco kaj paco

Kiuj defioj por la nuna mondo?

Oostende, 23/24 julio 2015

De la somero 1914 ĝis la aŭtuno 1918 okazis unu el la plej grandaj konfliktoj en la historio de la homaro. Ankaŭ en Flandrio la Granda Milito daŭris kvar jarojn. Unu jarcenton poste Flandrio volas rememori la multnombrajn viktimojn kaj kondamni la sensencan perforton. La memorprogramo estas instigilo por ekpensadi pri milito kaj paco. Flandrio volastre klare ligi la tutan projekton al la ideo de paco sub la slogano “Neniam plu milito”. Tiumaniere nunaj kaj estontaj generacioj ekpensados pri temoj kiel toleremo, interkultura dialogo kaj internacia kompreniĝo. La celo de la flandra projekto estas krei malferman, tolereman socion kun aktiva internacia orientiĝo.

Tio tre necesas en la nuna mondo, kie konfliktoj bedaŭrinde abundas. Ili kaŭziĝas pro malrespekto de kulturoj, religioj kaj lingvoj. Soldatoj bruligas bibliotekojn kaj kulturoj malaperas. Lingvoj ludas gravan rolon en konfliktoj kiel ekzemple en Ukrainio, Irako kaj aliaj. Nur pere de internacia kunlaboro, respekto por homaj rajtoj kaj paco ni povas krei demokratiajn kaj justajn sociojn, kie indas vivi kiel homo.

Nia simpozio volas prilumi tiujn esencajn komponantojn por monda paco kaj la faktorojn, kiuj povas minaci tiun pacon.

Jen kelkaj sugestoj por prelegtemoj:

1. La povo de lingvo / La lingvo de povo
2. Lingvo kaj paco/milito
3. Lingvo, edukado kaj paco
4. Multlingveco kaj demokratio
5. Multlingveco, socia justeco kaj identeco

6. Lingvaj rajtoj kaj lingva justeco
7. Kontribuo de Esperanto al la paco
8. Rolo de lingvo en nuntempaj konfliktoj
9. Lingva diverseco kaj lingva politiko.

Se vi volas prelegi pri tiu ĉi temaro, ni tre kore invitas vin sendi al la organizantoj vian prelegetitolon kune kun resumo de 100-200 vortoj, 3 - 5 ŝlosilaj vortoj kaj ĝis 150-vorta prezento de la aŭtoro. Vian prelegproponon kun tiuj elementoj bonvolu sendi ĝis la 15a de majo 2015* al: ***kristin.tytgat@skynet.be***, *
kopie al: ***radojica.petrovic.rs@gmail.com***.

Surbaze de viaj kontribuoj ni redaktos provizoran programon, kiun ni sendos al vi, kaj vi estos petataj sendi kompletan tekston de via prelego ĝis la 15-a de junio 2015. Viaj resumoj estos publikigitaj en la Konferenca Libro. Ni ankoraŭ komunikos al vi la kondiĉojn por publikigo de via kompleta prelego. Por via prelego vi disponos pri 20 minutoj kun 10 minutoj por diskuto.

La lingvo de la simpozio estas Esperanto kun eblaj kontribuoj de neesperantistoj en la angla aŭ la nederlanda. Se la prelego ne okazos en Esperanto, la ĉeestantoj ricevos resumon en Esperanto.

Ni vere esperas, ke vi entuziasme reagos al nia invito partopreni la simpozion, ĉu per kontribuo, ĉu per ĉeesto. La simpozio estas grava aranĝo dum la ILEI-konferenco, kiun ni komune povos sukcese realigi. Ĉiuj aliĝintoj de la konferenco aŭtomate rajtas partopreni en la simpozio sen apartaj aliĝilo kaj kotizo. Tuj, kiuj volas aliĝi nur al la simpozio kiel preleganto kaj/aŭ aŭskultanto, povas uzi la sama [aliĝilon](#) kiel por la tuta [konferenco](#) kaj pagi la nursimpozian kotizon de 30 EUR.

Bonvenon!

Kristin TYTGAT, prezidanto de la Organiza komitato

* En IPR 2015/1 estas donita la limdato 15 apr. 2015 por sendo de prelegproponoj; nun ĝi estas prokrastita ĝis 15 majo 2015.